

Theodor Storm,
Ruĝaj rozoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Feliĉon nian ni ne ĝuis
en trankvileco, sen pasi';
turmente ĝi nin superfluis,
ne konis la beaton ni.

Nin voris veo incendia,
plezur' ne estis tio ĉi!
Fariĝis pala vango via,
kaj rompis mian spiron ĝi.

En faŭkon estis ni ŝirataj,
torente ĝi englutis nin;
ni estis preskaŭ frakasataj,
ĝis kuŝis buŝ' sur buŝ' je l' fin'.

Mutiĝis fajrofonto nia
kaj sinkis de la vivo flam',
ĝis nove la fajrero dia
Ekbrulis ree per la am'.

*Traduko de la Germana poemo "Rote Rosen" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2002-04-06.*

MR-381-1 / Arg-186-375 (2004-06-20 18:19:47)